

PŘÍBĚHY SŇATKOVÉHO PODVODNÍKA

„To teda je pravda,“ pravil detektiv Holub a skromně odkašlal. „My na policii nemáme rádi nějaké extra a nebývalé případy; my taky nemáme rádi nové lidi. Takový starý, osvědčený zločinec, to je docela jiná práce; předně hnedle víme, že to udělal, protože to je jeho obor; za druhé víme, kde ho najít, a za třetí nám nedělá žádné cavyky a nezapírá, protože už ví, že mu to není nic platno. Páni, s takovým zkušeným člověkem pracovat je jedna radost. A já vám řeknu, že i v kriminále se tihle řemeslní zločinci těší zvláštní oblibě a důvěře; oni ti nováčkové a nahodilí provinilci jsou největší kverulanti a renitenti a nic jim není recht; ale takový starý kriminálník ví, že arest je riziko práce, a tak to zbytečně nezhořčuje sobě ani těm druhým. Ale to už sem vlastně nepatří. Jednou, tomu je pět let, jsme dostávali ze všech stran a koutů hlášení, že na českém venkově řádí neznámý sňatkový podvodník. Podle popisu to byl letitý pán, takový tlustší, holohlavý, s pěti zlatými zuby tady v hubě; dával si jméno Müller, Procházka, Šimek, Šebek, Šinderka, Bílek, Hromádka, Pivoda, Bergr, Bejček, Stočes a ještě všelijak jinak. Krucinál, ten popis se nám na žádného našeho sňatkového podvodníka nepasoval, to musí být někdo nový. Tak si mě zavolal náš pan rada a povídá: Holube, vy děláte tuhle vlakovou službu – když už někam jedete, dávejte pozor, nepotkáte-li nějakého chlapíka s pěti zlatými zuby. – No dobře, já jsem se začal dívat lidem ve vlaku na zuby a do čtrnácti dnů jsem načapal tři pány s pěti zlatými zuby; museli se mně legitimovat, ale ježíšmarjá, jeden z nich byl školní inspektor a jeden dokonce poslanec, a to se neptejte, páni, jak jsem za to dostal vynadáno od nich i u nás. Teda to mě dožralo, a teď teprv jsem si vzal do hlavy, že toho kujóna musím dostat. On to sic nebyl můj případ, ale já jsem si umanul, že se mu pomstím. Tak jsem si zajel privátně ke všem těm oklamaným sirotkům a vdovám, ze kterých ten zlatozubý taškář vylákal peníze pod slibem manželství. To byste nevěřili, co řečí a breku mají takové ty utiskované sirotky a vdovy. Všechny byly zajedno aspoň v tom, že to byl inteligentní a solidní pán a že měl zlaté zuby a že tak pěkně a slušně horoval o rodinném životě; ale žádná si od něho nevzala ani otisk palce – to je vám hrůza, jak jsou tyhle ženské lehkověrné. Jedenáctá oběť – to bylo v Kamenici – mně v slzách povídala, že ten pán byl u ní třikrát; vždycky přijížděl vlakem o půl jedenácté ráno, akdyž posledně odcházal s jejími penězi v kapse, podíval se na popisné číslo jejího domečku a překvapeně řekl: Helejte, slečno Mařenko, není-li to boží vůle, abychom se vzali;

HISTORIETOJ DE EDZIĜ-TROMPISTO

„Estas vere, diris detektivo Holub kaj modeste tusetis. „Ni ĉe la polico ne ŝatas iajn ekstrajn kaj neordinarajn kazojn; ankaŭ ni ne ŝatas novajn homojn. Tia malnova, elprovita krimulo, tio estas tute alia laboro; unue, tuj ni scias, ke li faris tion, ĉar tio estas lia fako; due, ni scias, kie lin trovi, kaj trie, li ne faras al ni malkomplezojn kaj ne malkonfesas, ĉar li scias jam, ke ĝi ne helpas al li. Sinjoroj, labori kun tia sperta homo estas vera ĝuo. Kaj mi diras al vi, ke ankaŭ en karceroj ĉi-metiaj krimuloj ĝuas specialan ŝaton kaj konfidon; la novuloj kaj, hazardaj deliktuloj estas la plej grandaj kverelantoj kaj obstinuloj, kaj pri nenio ili estas kontentaj; sed tia malnova krimulo scias, ke karceroj estas risko de laboro, kaj tial vane li amarigas tion nek al si nek al la aliaj. Sed cetere sufiĉe pri tio. Foje, antaŭ kvin jaroj, ni ricevadis de ĉiuj flankoj kaj anguloj raportojn, ke en la ĉeĥa provinco misagas nekona edziĝtrompisto. Laŭ priskribo li estis neĵuna sinjoro, diketa, kalva, kun kvin oraj dentoj en la buŝo; li donadis al si nomon Müller, Procházka, Šimek, Šebek, Šinderka, Bílek, Hromádka, Pivoda, Bergr, Bejček, Stočes kaj ankoraŭ diversajn aliajn. Sakre, la priskribo konvenis al neniuj el niaj edziĝtrompistoj, li devas esti iu nova. Nia sinjoro konsilisto venigis min kaj diras: Holub, vi deĵoras en trajnoj - kiam vi ien veturas, atentu, ĉu vi renkontos iun ulon kun kvin oraj dentoj. - Nu bone, mi komencis rigardi la dentojn de homoj en trajnoj kaj dum du semajnoj mi malkovris tri sinjorojn kun kvin oraj dentoj; ili devis legitimi sin al mi, sed Jesuomaria, unu en ili estis lerneja inspektor, kaj unu eĉ deputito, kaj vi ne demandu, kiel mi estis insultita pro tio de ili kaj ankaŭ ĉe ni. Tio do ege kolerigis min kaj nur nun mi prenis en la kapon, ke tiun friponegon mi devas kapti. Tio ja ne estis mia kazo, sed mi decidiĝis, ke mi venĝos al li.

Mi veturis private al la trompitaj orfoj kaj vidvinoj, de kiuj la ordenta fripono ellogis monon sub promeso de edzeco. Vi ne kredus, kiom da paroloj kaj ploro havas tiuj subpremataj orfoj kaj vidvinoj. Ĉiuj estis unuecaj en tio, ke li estis inteligenta kaj serioza sinjoro, ke li havis orajn dentojn kaj ke li tiel bele kaj bone ardis por la familia vivo, sed neniuj prenis de li eĉ premsignon de poks - estas terure, kiel ĉi virinoj estas facilkredemaj. La dek unua viktimo - tio estis en Kamenice - diris al mi larmante, ke tiu sinjoro estis ĉe ŝi trifoje; ĉiam li alveturis per trajno je la deka tridek minutoj matene, kaj forirante lastfoje kun ŝia mono en la poŝo, li rigardis la konskripcian numeron sur ŝia dometo kaj diris surprizite: Aj, fraŭlino Marinja, ĉu tio ne estas dia volo, ke ni geedziĝu;

vy máte číslo domu 618 a já za vámi vždycky vyjždím v 6 hodin 18 minut; není to dobré znamení? – Když jsem tohle slyšel, povídám: Slečno, to je namouduši dobré znamení. A hned jsem vytáhl jízdní řád a hledám, ze kterých stanic vyjždí vlak v 6 hodin 18 minut a má spojení na vlak, který dojede do Kamenice v 10 hodin 35 minut. Když jsem si to všechno srovnal a seštymoval, viděl jsem, že by to mohl být nejspíš vlak ze stanice Bystřice-Novoves. To víte, vlakový detektiv se musí ve vlačích vyznat. To se rozumí, když jsem měl první den volno, jel jsem do stanice Bystřice-Novoves a ptám se, nejezdí-li odtamtud nápadně často nějaký tlustý pán se zlatou hubou. To jezdí, povídal mně přednosta stanice, a je to pan Lacina, obchodní cestující, co bydlí tamhle v dolní ulici; zrovna včera večer odněkud přijel. Tak já jdu za tím panem Lacinou; na chodbě natrefím takovou drobnou a čist'ouňkou paní a povídám: Bydlí tu pan Lacina? To je můj muž, řekla, ale on teď po obědě spí. To nevádí, povídám, a jdu dovnitř. Na kanapi leží člověk bez kabátu a povídá: Jejej, to je pan Holub; maminko, podej mu židli. V tu chvíli ze mne spadla všecka zlost; vždyť on to byl starý losař Plichta, víte, co dělají ty losové podvody; ten Plichta už seděl aspoň desetkrát. Pozdrav bůh, Vincku, povídám, tak ty už neděláš losy? Ba ne, řekl Plichta a posadil se na kanapi. Pane Holub, ono to dá moc běhání, že jo, a já už nejsem mladík. Dvaapadesát let, to už člověk rád někde posedí; chodit od domu k domu, to už pro našince není. Proto ses dal na sňatkové podvody, vid', ty partyko, povídám mu. Plichta jen tak vzdychl. Pane Holub, řekl, něco člověk musí dělat. Víte, když jsem posledně seděl, tak se mně zkazily zuby; já myslím, že to dělá ta čočka. Tak jsem si je musel dát spravit, že jo; a to byste nevěřil, pane Holub, jaký kredit člověk dostane na zlaté zuby. Ono to budí důvěru, a taky člověk začne líp trávit a tloustnout. Co platno, našinec musí pracovat s tím, co má. A kde máš peníze? povídám mu. Já mám tuhle v notese jedenáct tvých podvodů, to dělá netto dvě stě šestnáct tisíc korun. Kde je máš? Ale pane Holub, řekl Plichta, to víte, tady všechno patří mé ženě. Obchod je obchod. Já nemám nic, než co mám při sobě: to je šest set padesát korun, zlaté hodinky a zlaté zuby. Maminko, já pojedu s panem Holubem do Prahy. Pane Holub, já ty zuby musím ještě splácet; to dělá tři sta korun, ty tu zrovna nechám. A sto padesát korun má dostat tvůj krejčí, připomněla maminka. Máš pravdu, pravil Plichta. Pane Holub, já si potrpím na správnost. Ono není nad to, mít ve všem pořádek, že jo. On je pak ten pořádek vidět člověku na ksichtě. Když nemáš dluhy, můžeš se každému podívat do očí.

vi havas domnumeron 618 kaj mi ekveturas ĉiam je la sesa 18 minutoj; ĉu tio ne estas bona antaŭsigno? – Aŭdinte tion, mi diras: Fraŭlino, tio estas, je mia animo, bona signo. Tuj mi eltiris horaron kaj serĉas, el kiuj stacioj elveturas trajno je la sesa 18 minutoj kaj havas komunikon al trajno, alveturanta al Kamenice je la deka 35 minutoj. Kiam ĉion mi komparis kaj akordigis, mi vidis, ke povus plej versimile temi pri trajno el stacio Bystřice-Novoves. Sciu, la trajn-detektivo devas esti sperta pri trajnoj. Memkomprene, kiam mi havis la unuan ferian tagon, mi veturis al stacio Bystřice-Novoves kaj demandas, ĉu veturadas de tie okulfrape ofte ia sinjoro kun ora buŝo. Jes, veturadas, diris staciestro, li estas sinjoro Lacina, komerca agento, kiu loĝas tie en la malsupra strato. Ĵus hieraŭ vespere li alveturis de ie. Mi iras do al tiu sinjoro Lacina; en koridoro mi renkontis tian etan kaj ege puran sinjorinon kaj diras: Ĉu loĝas ĉi tie sinjoro Lacina? Li estas mia edzo, ŝi diris, sed nun post la tagmanĝo li dormas. Ne gravas, mi diras, kaj eniras. Sur kanapo kuŝas homo sen jako kaj diras: Aj, aj, jen sinjoro Holub; panjo, donu seĝon al li. Tiumomente malaperis ĉia mia kolero; li estis ja malnova lot-agento Plihta, sciu, tiu faras lot-ĉarlatanaĵojn, tiu Plihta jam punsidis almenaŭ dekfoje. Dio cin salutu, Vinĉjo, mi diras, ci ne plu fikomercas kun lotoj? Jam ne, diris Plihta kaj sidiĝis sur la kanapo. Sinjoro Holub, tio postulas troan kuradon, ĉu, kaj mi ne plu estas junulo. Kvindek du jaroj, tiam oni ŝatas jam ie sidi; iradi de domo al domo, tio jam estas nenio por niulo. Tial ci transiris al edziĝtrompoj, ĉu, ci brokantulo, mi diras al li. Plihta nur ekĝemis. Sinjoro Holub, li diris, ion oni devas fari. Sciu, kiam lastfoje mi estis arestita, kariĝis miaj dentoj; mi opinias, ke ĝin kaŭzas la karcera lento. Mi devis do ilin riparigi, ĉu; kaj vi ne kredus, sinjoro Holub, kian krediton oni havas pro oraj dentoj. Ili vekas konfidon, kaj, ankaŭ oni komencas pli bone digesti kaj dikiĝi. Kion fari, niulo devas labori per tio, kion li havas. Kaj kie ci havas monon? mi diras al li. En mia notlibro mi havas dek unu ciajn trompojn, ili sumas netajn ducent dek ses mil kronojn. Kie ci havas ilin? Sed, sinjoro Holub, diris Plihta, sciu, ĉio ĉi tie apartenas al mia edzino. Komercas estas komercas. Mi havas nenion, krom tio, kion mi havas ĉe mi; tio estas sescent kvindek kronoj, ora horloĝo kaj oraj dentoj. Panjo, mi veturos kun sinjoro Holub al Prago. Sinjoro Holub, ankoraŭ mi devas la dentojn partopagi; tio sumas tricent kronojn, mi lasos ilin tuj ĉi tie. Kaj cent kvindek kronojn devas ricevi via tajloro, rememorigis lin la panjo. Vi pravas, diris Plihta. Sinjoro Holub, pasie mi ŝatas la ĝustecon. Nenio pli bona ol ordo en ĉio, ĉu. Tiam la ordo estas videbla sur la vizaĝo. Kiam vi ne havas ŝuldojn, vi povas rigardi en ĉies okulojn.

To už patří ke kšeftu, pane Holub. Maminko, okartáčuj mně trochu ten zimník, abych ti nedělal v Praze ostudu. Tak, můžeme jet, pane Holub. Tehdy ten Plichta dostal pět měsíců; ty ženské vám většinou před porotou prohlásily, že mu ty peníze daly dobrovolně a že mu to odpouštějí. Jenom jedna bába mu nic neslevila, a to byla bohatá vdova, kterou pumpnul jenom o pět tisíc. Půl roku nato jsem slyšel, že zas jsou v tahu nějaké dva sňatkové podvody. To bude Plichta, řekl jsem si, ale dál jsem se o to nestaral. V tu dobu jsem měl co dělat v Pardubicích na nádraží, protože tam působil jeden kufrař, víte, co kradou na peróně zavazadla. A protože jsem měl asi hodinku od Pardubic v jedné vesnici svou rodinu na letním bytě, vzal jsem pro ni do kufříku párky a takové ty uzeniny; to víte, na vesnici je to vzácnost. A jak tak jedu, prošel jsem ze zvyku celý vlak; a v jednom kupé vám sedí Plichta s takovou starší dámou a něco vykládá, jak je ten svět zkažený. Vincku, povídám, už zase někomu slibuješ manželství? Plichta se začervenál a honem se té dámě omlouval, že má tady s tím pánem obchodní jednání; a když za mnou vyšel na chodbičku, povídá káravě: Pane Holub, to byste mně nemusel dělat před cizími lidmi; na mne stačí mrknout, a jdu. Skrz co mě hledáte? Máme tu zas dva případy, Plichto, povídám mu. Ale já mám dnes jinou práci, já tě dám četníkům v Pardubicích. Ale pane Holub, to mně nedělejte; já už jsem na vás zvyklý, vy mě taky znáte, já půjdu raději s vámi. No tak, pane Holub, ze staré známosti. To nejde, povídám, já nejdřív jdu za svou rodinou, to je hodinka cesty. Co bych s tebou zatím dělal? Já vás doprovodím, pane Holub, navrhoval Plichta. Aspoň vám ta cesta líp uteče. Nu dobrá, tak tedy šel ten Plichta se mnou; a když už jsme byli za městem, povídá: Ukažte, pane Holub, já vám ten kufřík ponesu. Koukněte se, pane Holub, já jsem starší člověk; a když vy mně před lidmi tykáte, tak to dělá takový divný dojem. Tak jsem ho pak představil své ženě a švagrové jako svého starého přítele pana Plichtu. Poslouchejte, má švagrová je dost hezká holka a je jí pětadvacet let, ale ten Plichta tak pěkně a solidně mluvil a dal dětem bonbóny – zkrátka, když jsme vypili kafe, navrhl pan Plichta, že by jako šel se slečnou a s dětičkami na procházku, a jen tak na mne mrknul, jakože my chlapi si rozumíme a že si mám se svou starou co povídat. Takový to byl ušlechtilý člověk. A když se za hodinu vrátili, děti si vedly pana Plichtu za ruce, švagrová byla jako růžička a při loučení mu moc dlouho tiskla ruku. Poslouchej, Plichto, povídám mu potom, co tě to napadlo plést naší Mániče hlavu? To už je takový zvyk, řekl Plichta skoro smutně.

Tio apartenas jam al la negoco, sinjoro Holub. Panjo, brosu iom mian vintro-surtuton, por ke mi ne faru al vi malhonoron en Prago. Ni povas do veturi, sinjoro Holub. Tiam Plihta estis kondamnita por kvin monatoj; la vi-rinoj plejparte deklaris antaŭ asizo, ke la monon ili donis al li memvole, ke ili pardonas tion al li. Nur unu virinaĉo ne pardonis al li, kaj ŝi estis riĉa vidvino, de kiu li elpumpis nur kvin mil. Duonjaron poste mi aŭdis, ke denove okazis du edziĝtrompoj. Versimile denove Plihta, mi diris al mi, sed plu mi ne zorgis pri tio. Tiutempe mi havis ian laboron en stacidomo de Pardubice, ĉar tie aktivis kofro-ŝtelisto, sciu, kiu ŝtelas valizojn sur kajo. Kaj ĉar mi havis en iu vilaĝo, horeton de Pardubice, mian familion en somerloĝejo, mi prenis por ĝi kolbasetojn en kofreto kaj iajn salamojn; vi scias, ke en vilaĝo ĝi estas maloftaĵo. Kaj veturante, mi trairis laŭkutime la tutan trajnon; kaj en iu kupeo sidas Plihta kun ia neĵuna sinjorino kaj rakontas, kiel la mondo es-tas malvirta. Vinĉjo, mi diras, denove jam ci promesas edziĝon al iu? Plihta ruĝiĝis kaj rapide ekskuzis sin al la sinjorino, ke li havas ĉi tie kun la sinjoro negocan traktadon; kaj elirinte post mi en la koridoron, li diras al mi riproĉe: Sinjoro Holub, tion vi ne devus fari al mi antaŭ fremdaj homoj; sufiĉas al mi okulsigni kaj mi iras. Kial vi serĉas min? Ni havas ĉi tie du kazojn, Plihta, mi diras al li. Sed hodiaŭ mi havas alian laboron, mi transdonos cin al ĝendarmoj en Pardubice. Ho, sinjoro Holub, tion ne faru al mi; mi estas kutima je vi, ankaŭ vi min konas, mi iros prefere kun vi. Nu, sinjoro Holub, pro la malnova konateco. Ne eblas, mi diras, unue mi devas iri al mia familio, horeton de ĉi tie. Kion mi farus dume kun ci? Mi akompanos vin, sinjoro Holub, proponis Plihta. Almenaŭ la vojo pli bone pasos al vi. Nu bone, tiu Plihta do iris kun mi; kaj kiam ni estis jam ekster la urbo, li diras: Jen, sinjoro Holub, mi portos vian kofreton. Rigardu, sinjoro Holub, mi estas pli aĝa ho-mo; kaj kiam vi ciadas al mi antaŭ homoj, ĝi impresas strange. Mi prezentis lin al miaj edzino kaj bofratino kiel mian malnovan amikon, sinjoron Plihta. Aŭskultu, mia bofratino estas sufiĉe bela knabino kaj havas dudek kvin jarojn, sed tiu Plihta tiel bele kaj serioze parolis kaj al la infanoj li donis bombonojn, -mallonge, kiam ni eltrinkis kafon, proponis sinjoro Plihta, ke li povus fari kun la fraŭlino kaj la infanetoj promenon, kaj nur tiel okulsignis al mi, ke ni viroj komprenas ja unu la alian kaj ke mi havas kun mia edzino ion por paroli. Tia nobla homo li estis. Kaj kiam ili revenis post unu horo, la infanoj kondukis sinjoron Plihta je la manoj, la bofratino estis kiel rozeto kaj dum la adiaŭo ŝi ege longe premis lian manon. Aŭdu, Plihta, mi diras al li poste, kian ideon ci havis, konfuzi la kapon de nia Manja? Tio estas ja tia kutimo, diris Plihta preskaŭ malĝoje.

Pane Holub, já už za to ani nemůžu, to dělají ty zuby. Já mám z toho jen nepříjemnosti, že jo. Já se ženskými nikdy nemluvím o lásce, to se na můj věk nepasuje; a vidíte, právě na to berou nejvíc. Tak si někdy říkám, že mě ani nemilují kvůli mně, ale ze zjištění, protože vypadám na zajištěné postavení. Když jsme zas byli v Pardubicích na nádraží, povídám mu, Plichto, já tě přece musím dát četníkům, protože mám tady vyšetřit nějakou krádež. Pane Holub, prosil Plichta, tak mě zatím posad'te tuhle do restaurace; já si dám čaj a přečtu si noviny – tady máte mé peníze, je to čtrnáct tisíc a ještě něco; a bez peněz vám neuteču, vždyť nemám ani čím zaplatit útratu. Tak jsem ho posadil do nádražní restaurace a šel jsem po svém. Za hodinu jsem nahlédl oknem; seděl na svém místě, na nose zlatý skřípec, a četl noviny. Asi za půl hodiny jsem byl hotov a jdu za ním. Teď už seděl u vedlejšího stolu s nějakou nápadně kyprou blond paní a důstojně káral sklepníka, že jí dal v kafi škraloup. Když mě viděl, poroučel se té paničce a šel ke mně. Pane Holub, povídá, nemohl byste mě sebrat až za týden? Já bych teď měl zrovna nějakou práci. Moc bohatá? ptám se ho. Plichta jen mávnul rukou. Pane Holub, šeptal, ona má továrnu; a moc by potřebovala zkušeného člověka, aby jí sem tam poradil. Teď zrovna má platit nějaké nové stroje. Aha, já řku, tak pojď, já tě představím. A jdu k té paničce. Tě bůh, Lojzičko, povídám, pořád ještě loviš tyhlety starší pány? Ta blondýnka se začervenala až po lopatky a řekla: Žišmarjá, pane Holub, já nevěděla, že ten pán je váš přítel! Tak se hled' ztratit, povídám jí. Pan rada Dundr by chtěl s tebou mluvit; to víš, on tomu říká podvody. Plichta byl zdrcen. Pane Holub, řekl, to bych jakživ nevěřil, že ta panička je taky podvodnice! Je, říkám mu, a k tomu lehká ženská; představ si, že láká ze starších pánů peníze pod slibem manželství. Plichta přímo zbledl. Fuj tajksl, odplivl si, pak má člověk těm ženským věřit! Pane Holub, tohle už přestává všecko! Tak počkej tady, já na to, a já ti koupím lístek do Prahy. Druhou nebo třetí? Pane Holub, bránil se Plichta, to je škoda peněz. Jako zatčený mám právo na cestu zdarma, že jo. To už mě svezte za erární peníze. Našinec musí počítat s každým šestákem. Celou cestu až do Prahy nadával Plichta na tu ženskou; to vám bylo nejhlubší mravní rozhořčení, které jsem kdy viděl. Když jsme vystupovali v Praze, povídá Plichta: Pane Holub, já vím, tentokrát to bude sedm měsíců; a mně ta vězeňská strava nesvědčí. Helejte, já bych se ještě jednou rád slušně najed. Těch čtrnáct tisíc, co jste mně vzal, to je všecko, co mně poslední případ vynes, – tak ať mám z toho aspoň jednu večeři;

Sinjoro Holub, preskaŭ mi eĉ ne estas kulpa pri tio, tion faras la dentoj. Mi havas pro ili nur malagrablojn, nu. Kun virinoj neniam mi parolas pri la amo, tio ne konvenas al mia aĝo; kaj vidu, ĝuste tio estas por ili la plej altira. Iam mi diras al mi, ke ili ne amas min pro mi, sed pro la profi-temo, ĉar mi aspektas kiel iu kun sekurigita posteno. Kiam ni estis denove en la stacidomo de Pardubice, mi diras al li, Pliĥta, tamen mi devas cin transdoni al ĝendarmoj, ĉar mi devas ĉi tie esplori ian ŝtelon. Sinjoro Holub, petis Pliĥta, sidigu min dume en ĉi restoracion; mi mendos teon kaj legos ĵurnalon - jen mia mono, sume dek kvar mil kaj ankoraŭ iom; kaj sen mono mi ne fuĝos al vi, mi havas ja neniom por pagi la elspezon. Mi sidigis lin en la stacidoman restoracion kaj zorgis pri miaj aferoj. Post unu horo mi enrigardis tra fenestro: li sidis sur sia loko, sur la nazo oran nazumon kaj legis-ĵurnalon. Proksimume post duonhoro mi estis preta kaj iras al li. Nun jam li sidis ĉe la apuda tablo kun iu okulfrape graspufa blonda sinjorino kaj digne riproĉis kelneron, ke li donis al ŝi laktokruston en la kafo. Ekvidinte min, li diris adiaŭ al la sinjorineto kaj iris al mi. Sinjoro Holub, li diras, ĉu vi povus aresti min nur post unu semajno? Ĝuste nun mi havas ian laboron. Ĉu ege riĉa? mi demandas lin. Pliĥta nur mansvingis. Sinjoro Holub, li flustris, ŝi havas fabrikon; kaj tre ŝi bezonus spertan homon, kiu konsultos ŝin de temp' al tempo. Ĝuste nun ŝi devas pagi iajn novajn maŝinojn. Ha, mi diras, venu, mi prezentos cin. Kaj mi iras al la sinjorineto. Hej, Luizeta, mi diras, ĉu ci ankoraŭ nun kaptas tiajn nejunajn sinjorojn? La blondulino ruĝiĝis ĝis la skapoloj kaj diris: 'Suomaria, sinjoro Holub, mi ne scias, ke tiu sinjoro estas via amiko! Zorgu malaperi, mi diras al ŝi. Sinjoro konsilisto Dundr volus paroli kun ci; sciu, li nomas tion trompoj. Pliĥta estis konsternita. Sinjoro Holub, li diris, neniam mi kredus, ke la sinjorineto ankaŭ estas trompistino! Ŝi estas, mi diris al li, kaj krome facilmora virino; imagu, ke ŝi logas de nejunaj sinjoroj monon sub promeso de edzeco. Pliĥta eĉ paliĝis. Fi, li forkraĉis, oni kredu al la virinoj! Sinjoro Holub, kiel nekredebla! Atendu do ĉi tie, mi aldiris, mi aĉetos por vi bileton al Prago. Ĉu la duan aŭ trian? Sinjoro Holub, oponis Pliĥta, domaĝe pri la mono. Kiel arestito mi rajtas veturi senpage, ĉu. Vi veturigos min jam per ŝtata mono. Niulo devas kalkuli kun ĉiu helero. Dum la tuta vojaĝo al Prago insultis Pliĥta tiun virinon; tio estis la plej profunda morala indigno, kiun iam ajn mi vidis. Dum elvagiĝo en Prago, diras Pliĥta: Sinjoro Holub, mi scias, ke ĉi-foje mi ricevos sep monatojn; kaj la karcera nutrado ne prosperas al mi. Jen, mi ŝatus ankoraŭ foje bone manĝi. La dek kvar mil, kiujn vi prenis de mi, estas ĉio, kion mi gajnis en la lasta kazo - mi havu do el tio almenaŭ unu vespermanĝon;

a já bych se vám rád revanžoval za to kafe. Tak jsme šli spolu do jedné lepší hospody; Plichta si dal roštěnku a vypil pět piv, a já jsem to zaplatil z jeho tobolky, když on předtím třikrát přepočítal účet, aby nás sklepník neošidil. Tak, a teď na direkci, povídám. Moment, pane Holub, řekl Plichta. Já jsem měl s tím posledním případem velikou režii. To byly čtyři cesty tam a zpátky po čtyřiceti osmi korunách, to dělá tři sta osmdesát čtyři koruny. – Přitom si nasadil skřípec a počítal na kusu papíru. – Potom diéty, řekněme třicet korun za den, – já musím být slušně živ, pane Holub, to patří ke kšeftu. Tak to dělá sto dvacet korun. Potom jsem dal té slečně kytici za pětatřicet korun, to víte, to je taková zdvořilost. Snubní prstýnek stál dvě stě čtyřicet, – byl jen pozlacený, pane Holub; kdybych nebyl poctivý člověk, řekl bych, že je zlatý a počítal bych šest stovek, že jo. Potom jsem jí koupil dort za třicet korun; pak máme pět dopisů po koruně, a inzerát, na který jsem se s ní seznámil, stál osmnáct korun. Tak to dělá osm set třicet dvě koruny, pane Holub. Prosím vás, ty peníze mně musíte odpočítat; a já si je zatím nechám u vás. Já mám rád pořádek, pane Holub; aspoň tu režii musím mít krytou. Tak, a teď můžeme jít. A když už jsme byli na chodbě policejního ředitelství, vzpomněl si ten Plichta najednou: Pane Holub, vždyť já jsem té slečně daroval ještě lahvičku voňavky; tak to mám ještě dvacet korun k dobru. Pak se pečlivě vysmrkal a nechal se s klidnou myslí odvést.”

kaj mi ŝatus kompensi al vi la kafon. Ni iris kune en ian pli bonan restoracion; Pliĥta mendis rostbefon kaj eltrinkis kvin bierojn, kaj mi pagis tion el lia monujo, post kiam antaŭe trifoje li rekalkulis la fak-turon, por ke la kelnero ne pritrompu nin. Kaj nun al la direkcio, mi diras. Momenton, sinjoro Holub, diris Pliĥta. Kun la lasta kazo mi havis grandan elspezon. Estis kvar veturoj tien kaj reen po kvardek ok kronoj, tio sumas tricent okdek kvar kronojn - Dume li surmetis la nazumon kaj kalkulis sur peceto da papero. Poste restadkostoĵoj, ni diru tridek kronojn tage - mi devas bonstate vivi, sinjoro Holub, tio apartenas al la negocado. Tio sumas cent dudek kronojn. Ankaŭ mi donis al la fraŭlino bukedon por tridek kvin kronoj, vi scias, tio estas ĝentilaĵo. Edziĝringo kostis ducent kvardek - ĝi estis nur orizita, sinjoro Holub; se mi ne estus honesta homo, mi dirus, ke ĝi estis ora kaj mi kalkulus ses centojn, ĉu. Plue mi aĉetis al ŝi torton por tridek kronoj; plue ni havis kvin leterojn po unu krono, kaj la gazetanonco, pere de kiu mi konatiĝis al ŝi, kostis dek ok kronojn. Ĝi sumas do okcent tridek du kronojn, sinjoro Holub: Mi petas vin, tiun sumon vi devas dekalkuli al mi; kaj mi lasos ĝin dume ĉe vi. Mi ŝatas ordon, sinjoro Holub; almenaŭ elspezojn mi devas havi kvititajn. Kaj nun ni povas iri. Kaj kiam ni estis jam en la koridoro de la polica direkcio, subite Pliĥta rememoris: Sinjoro Holub, mi donacis ankaŭ al la fraŭlino parfumon, ankoraŭ mi havas dudekkronan bonhavon. Poste li zorge mungis kaj lasis sin forkonduki kun trankvila menso.”